## Noto de Mireille Grosjean al IEK, UEA, ILEI

## Dato : 28an de februaro 2009

## Temo : raporto pri la laboro de IEK dum 2008

---

**Konsisto de IEK**
Dum 2008 okazis demisio de Boris Kolker.
Dum 2008 estis neniu kontakto kun Oliver Mazodze.
Konsekvence IEK laboras per kvin membroj.
(Monika Molnar, Reza Torabi, Antonio Leoni de Leon, Julian Hernandez Angulo, Mirejo Groĵan)

**GVIDILO**
Tria eldono de la Gvidilo « Internaciaj Ekzamenoj de ILEI / UEA » eldoniĝis por UK 2008.

**Verkado de TESTOJ**
Tiu tasko efike kaj glate funkcias. Estas bona kunlaboro (verkado kaj korektado) ene de IEK kaj en kunlaboro kun diversaj personoj eksteraj, ĉefe du samideaninoj el Armenio.

**SESIOJ en 2008**
Julio : Montrealo, Kanado
Julio : Roterdamo, Nederlando
Julio : Portonovo, Benino
Aùgusto: Lomé, Togolando
Aùgusto: Vatomandry, Madagaskaro
Decembro: Hashtgerd, Irano

UK Nederlando 21-24072008
(kandidatoj 17, Sukcesintoj 13):
Elementa: 3
Meza: 10

2. Madagaskaro 15082008
(kandidatoj 3, sukcesintoj 3, nur elementa nivelo):

3. Benino 01082008
(kandidatoj 20, sukcesintoj: elementa nivelo 3, meza nivelo: 3):
Elementa: 3
Meza: 3

4. Kanado 16072008
(kandidatoj 3, sukcesintoj 3, nur elementa nivelo):

5. Irano 15122008
(kandidatoj 6, sukcesintoj 5, nur elementa nivelo):

Entute 27 personoj sukcese trapasis la ekzamenojn dum 2008.

**Decidoj de IEK en 2008**

- La lokaj lingvoj parolataj de LEK-membroj estas agnoskitaj.
- Precizigoj pri diskonigo de rezultoj

**Rekomendoj de IEK en 2008**

Al IRE-membroj : aniĝo al UEA, aniĝo al ILEI. Trapaso de la ekzamenoj en meza nivelo.

**IRE**

Plua laboro okazis pri IRE. Mi venigis plurajn novajn membrojn laù la bezono de la okazigataj sesioj kaj laù la renkontiĝoj, kiujn mi povis fari en la mondo. La perreta voĉdono bone antaùeniras. Nun IRE nombras 111 personojn. Nun Excel-tabelo ekzistas kun precizaj datumoj pri preskaŭ ĉiu IRE-membro. Tiu dokumento estas en tri komputiloj de IEK-anoj.
Ĉiuj konataj retadresoj de IRE estas en mia komputilo. Jam dufoje en 2008 mi sendis retmesaĝon al IRE-membroj.

**Kunlaboro kun retejoj**

Ekzistas kunlaboro kun retejoj de **ILEI** kaj **edukado** punkto **net**.
Tie oni povas legi

- La gvidlibron « Internaciaj Ekzamenoj de ILEI / UEA »
- La aktualan liston de IRE
- La decidojn de IEK
- La daton kaj lokon de la venontaj sesioj

**Taskoj por la estonteco**

- Sekvi la sesiojn, kontroli la konsiston de LEK kaj verki la testojn. (daŭra tasko)
- Grandigi IRE-n. (jam survoje)
- Havi perretan arkivejon (jam survoje)
- Sekvi la evoluigon de la novtipa ekzamena sistemo en kunlaboro kun la komisiito de UEA Zsofia Korody. (jam survoje)
- Prilabori regularon por ekzameno por blinduloj (jam survoje)
- Prilabori rekomendon al landaj sekcioj de UEA kaj ILEI sekcioj pri sojla nivelo (jam survoje)
- Prilabori dokumenton, kiu difinas la financajn aspektojn de la ekzamenoj.(jam survoje)
- Prilabori superan nivelon.
- Prilabori sistemon de diplomo pri esperanto-instruado.

**Elektoj**

2009 estas elektojaro por IEK. Konsentas plulabori ene de IEK: Monika Molnar, Reza Torabi, Mirejo Groĵan. Jam en 2008 mi liveris al la prezidanto de UEA kaj al la prezidanto de ILEI kandidatiĝon de kvar personoj, por ke IEK denove nombru sep personojn. Mi ne scias, ĉu Oliver Mazodze denove kandidatiĝas, ĉar mi ricevas neniun respondon de li. Kaze ke jes, estos kvin kandidatoj por kvar postenoj.

Kyoto, Japanio, 28an de februaro 2009
Mirejo Groĵan (Mireille Grosjean) prezidanto de IEK.